



Informilo de Liberec'

ENHAVO:

Bonvenon	1
Kultur-Lingva Festivalo	2
JoMo rekordos!	2
Unua fleŝmobo!	2
Kunportindaĵoj	3
Antaŭkongreso	4
kaj karavanoj	
Alvenebloj el Germanio	4
kaj Pollando	
Transporto en kaj de	5
Prago	
Alveno al la kongresejo	8
Lastaj sciindaĵoj	10
Mapo de Liberec	11

65-a
internacia junulara
kongreso de TEJO

65.
mezinárodní kongres
esperantské mládeže

Kara aliĝinto,

post malpli ol tri semajnoj vi estos unu el la pli ol 300 partoprenantoj de la INTERNACIA JUNULARA KONGRESO en Liberec'. La internacia organiza teamo konsistanta el la Ĉeĥa, Pola kaj Germana Esperanto-Junularoj jam antaŭĝojas bonvenigi vin en la plej granda urbo de la regiono Liberec'. Ĝi proksimas al la fama tri-landlimo Ĉeĥio-Germanio-Pollando.

La ĉi-jara IJK proponos plurajn kaj eĉ unikajn programerojn al vi. Interalie vi havos la eblecon ekzameniĝi en diversaj niveloj de Esperanto, ni kune kaj publike festos la Kultur-Lingvan Festivalon, ni spertos la rekordrompon de la fama muzikisto kaj kantisto JoMo kaj ni okazigos nian unuan Esperanto-fleŝmobon!

Kiel vi vidas, vi jam rajtas antaŭĝojegi la Internacian Junularan Kongreson en Liberec'!

Kultur-Lingva Festivalo

Jam tradicie dum IJK okazas Kultur-Lingvaj Festivaloj. Ĉi-jare ni povas prezenti niajn diversajn kulturojn sur centra placo de la urbo Liberec!

La Kultur-Lingva Festivalo estos bonega okazo por montri al la publiko ke Esperanto kunigas homojn el la tuta mondo. Des pli gravas ke niaj memprezentadoj estas bone preparitaj.

Kunportu do viajn plej bongustajn frandaĵojn, viajn plej belajn mapojn kaj diversajn tipajn specialaĵojn - sur standoj vi povos prezentiĝi al la publiko.

Ni montru al la LIBERECANOJ nian diversecon kaj komunecon!

JoMo rekordas!

Kiel partoprenanto de la IJK vi havos la unikan ŝancon spekti la rekordrompan koncerton de JoMo!

La fama muzikisto kantas pli ol 20 kantojn en diversaj lingvoj.

Venu kaj eksciu ĉu ankaŭ via lingvo troviĝas en la vasta vokabularo de JoMo.



Unua fleŝmobo!

Ĉu vi jam partoprenis fleŝmobon (flash mob, fulmobando) kaj spertis tiun unikan senton kiu estiĝas kiam amasoj da (ŝajne) sendependaj homoj en publika spaco tute subite same agas dum kelkaj sekundoj?

Estas malfacile priskribi tiun ĉi etoson – tial vi nepre venu kaj partoprenu la unuan fleŝmobon dum IJK!

Kunportindaĵoj

Kiajn vestaĵojn kunporti vi povas mem elekti. Laŭbezzone indas kunporti naĝkostumon kaj bantukon, **zamenhofecajn kostumojn** kaj sport-vestojn (memoru la matenan kuradon de la kuraĝuloj).

Krome, Liberec estas nomata "Pispoto de Eŭropo" - do indas prepariĝi al pluva vetero.

Se vi estos studento aŭ lernanto (dum IJK), bonvolu sendi ret-mesaĝon pri tio al ijk.ejoj@esperanto.cz kaj por IJK bv. kunporti taŭgan **legitimilon**. Tiel ni povos ŝpari iomete da loĝkosto, kaj havos pli da mono por la programo.

Antaŭkongreso

Se vi volas vojaĝi al la IJK kun aliaj partoprenantoj, konsideru partopreni en antaŭkongreso aŭ karavano. Tuj antaŭ IJK okazos SES en Slovakio kaj KVAK – antaŭkongreso en Vieno kun sekva vojaĝo al IJK.

Denove okazos la KLF (Kultura kaj Lingva Festivalo), ĉi-foje vere grandskale en la urba ĉefplaco! Do ni petas vin kunporti **tipajn specialaĵojn de via regiono** - ekz. tradiciajn manĝaĵojn kaj specialajn trinkaĵojn, sed ankaŭ muzikilojn, bildojn, vestaĵojn.

Simple enpaku ĉion kion vi taksas tipa por via hejmregiono.

Cetere, bv. konservi viajn **vojaĝbiletojn**. Kelkaj landaj sekcioj ja ofertas vojaĝkost-subvenciojn.



Karavanoj al IJK

BEMI organizas biclikadon el Szezecin kaj Alekĉjo trajnan karavanon el Francio tra Germanio.

<http://tinyurl.com/bemikaravano>
<http://tinyurl.com/trajnakaravano>



Alvenebloj el Germanio kaj Pollando

En regiono ĉirkaŭ la tri-landlimo Ĉeĥio-Germanio-Pollando funkcias internacia transportsistemo ZVON (www.zvon.de). Se vi venos al Liberec' trajne el la proksimaj partoj de Germanio aŭ Pollando, konsideru uzi ilian bileton "EURO-NEISSE" / "EURO-NYSA" por vojaĝi malmultekoste trans la limo ĝis Liberec'.

Karavano al la UK en Bjalistoko

Post la IJK vi povos partopreni en trajna karavano al la 94-a UK en Bjalistoko (Pollando). La karavano ekveturos sabate la 25-an de julio matene kaj alvenos al Bjalistoko vespere je 21:55 (ekde Varsovio ni veturos per la fama trajno "Zamenhof"). Antaŭvidata prezo estas ĉirkaŭ 25 eŭroj. Aliĝi eblos surloke dum la IJK.

Tiu bileto estas unutaga, ekzistas en versioj por unuopuloj kaj por grupoj, kaj ĝi validas ankaŭ en la urbo trafiko en Liberec'.

Informoj en diversaj lingvoj:
<http://tinyurl.com/zvonde>
<http://tinyurl.com/zvonpl>
<http://tinyurl.com/zvoncs>
<http://tinyurl.com/zvonwen>

Transporto en kaj de Prago (Praha)

Se vi alvenas al Prago per aviadilo

La flughaveno **Praha-Ruzyně** [ruzinje] troviĝas 17 kilometrojn nord-okcidente de la centro de Prago. La flughavena haltejo de la urba trafiko nomiĝas **Letistě Ruzyně**. Por vojaĝi de tie al **Černý Most** (de kie forveturas busoj al Liberec) ekzistas du eblecoj:

1-a ebleco: Prenu buson 119 ĝis la finhaltejo **Dejvická** [dejvickaa]. De tie uzu la linion A (verda) de la metroo. En la metroo en haltejo **Můstek** [muustek] ŝanĝu al la linio B (flava; por ŝanĝi iru supren) kaj veturu ĝis la finhaltejo **Černý Most** [černii most].

2-a ebleco: Prenu buson 100 ĝis la finhaltejo **Zličín** [zličiin]. De tie uzu la linion B (flava) de la metroo kaj veturu ĝis la finhaltejo **Černý Most** [černii most].

Por ĉiu ebleco vi bezonas proksimume **70 minutojn**, sed la 2-a ebleco povas esti pli komforta se vi havas tre multe da pakaĵoj.

Se vi alvenas al Prago per trajno

Se vi alveturos trajne al la stacidomo **Hlavní nádraží** [hlavnjii naadrajii], uzu la linion C (ruĝa) de la metroo (enirejo estas rekte en la stacidomo). Veturu ĝis haltejo **Florenc** (direkto Letňany). Tie ŝanĝu al la linio B (flava; iru supren) kaj veturu en direkto **Černý Most** [černii most] ĝis la finhaltejo. La vojaĝo daŭras **25 minutojn**.

Se vi alveturos trajne al la stacidomo **Holešovice** [holeŝovice], uzu la linion C (ruĝa) de la metroo (la haltejo nomiĝas **Nádraží Holešovice** [naadrajii holeŝovice]). Veturu ĝis haltejo **Florenc** (direkto Háje). Tie ŝanĝu al la linio B (flava; iru suben) kaj veturu en direkto **Černý Most** [černii most] ĝis la finhaltejo. La vojaĝo daŭras **30 minutojn**.

Esceptokaze vi alveturos al la stacidomo **Masarykovo nádraží** [masarikovo naadraĵii]. Uzu la linion B (flava) de la metroo (la haltejo nomiĝas **Náměstí Republiky** [naamnjestii republiky]). Veturu en direkto **Černý Most** [ĉernii most] ĝis la finhaltejo. La vojaĝo daŭras **17 minutojn**

Se vi alvenas al Prago per buso

Se vi alveturos buse al la busa stacidomo **Florenc**, uzu de tie la linion B (flava) de la metroo (la haltejo nomiĝas ankaŭ Florenc; enirejo troviĝas ekster la stacidoma konstruaĵo). **Sed atentu:** Tra Florenc trairas ankaŭ la linio C, do ne eraru! Via linio B troviĝas pli profunde ol la linio C. Veturu en direkto **Černý Most** ĝis la finhaltejo. La vojaĝo daŭras **15 minutojn**.

Veturbiletoj en Prago

Por la vojaĝo ĝis **Černý Most** vi bezonas aĉeti veturbileton de la praga trafikfirmao (Dopravní podnik města Prahy). En la flughaveno tio eblas en vendmaŝino, kiu troviĝas rekte ĉe la bushaltejo, antaŭ la flughavena halo. Atentu, ke vi bezonos monerojn de la ĉeĥa krono por fari tion! Alternative, la trafikfirmao vendas ilin ankaŭ en speciala vendejo rekte en la flughavena halo. Aliloke en Prago ankaŭ tabakvendejoj vendas biletojn, kaj en buso eblas aĉeti bileton ĉe la ŝoforo (sed tio estas pli multekosta).

Baza bileto kostas **26 Kč** (ĉeĥajn kronojn) kaj valoras **75 minutojn** ekde la momento kiam vi ĝin stampis (tion vi faras en stampmaŝino tuj post eniri aŭtobuson aŭ tramon, aŭ en simila maŝino jam kiam vi eniras haltejon de la metroo). Jam stampitan bileton oni dum ŝanĝo de unu trafikilo al alia ne plu stampas denove!

Se vi kunportas grandan kofron, teorie vi devus pagi ankoraŭ 13 Kč por ĝi.

En la praga metroo oni ŝanĝas de linio al linio ĉiam per iri malsupren aŭ supren.

Se vi volas, vi povas facile antaŭserĉi vian vojaĝon en Prago per la interreto ĉe www.dpp.cz (ĉeĥe, germane, angle).

Vojaĝo de Prago al Liberec'

En la stacidomo de Černý most, busoj al Liberec' foriras de haltejo numero **7**. Alveninte per metroo, uzu la elirejon kiu estas plej proksima al la unua vagono de la metroo. Trairu la vitran pordon, malsupreniru laŭ la ŝtuparo (tiu pli proksima de la metroo; busoj staras en du paralelaj vicoj) kaj iru kelkajn paŝojn en la sama direkto en kiu vi veturis.

De Prago (Černý most) al Liberec

Al Liberec oni povas veturi kun unu el du kompanioj: **Student Agency** (rekonebla laŭ siaj flavaj busoj) kaj **Dopravní podnik města Liberce** (GTS Travel). La vojaĝo kostas ĉirkaŭ 100 Kč, sed ekzistas rabatoj por studentoj. Nia bonveniganto atendos vin surloke, facile rekonebla, kaj helpos al vi mendi vian biletan.

Atentu, ke la **lasta buso al Liberec' forveturas je 21.30!** Krome, kiel mizera kaj escepta ebleco (ekz. se vi ne plu trovas liberan lokon), vi povas veturi al Liberec' tra la proksima urbo **Jablonec nad Nisou** (busoj forveturas ankaŭ de haltejo 7). En Jablonec nad Nisou eliru en la antaŭlasta haltejo **U Gymnázia**, iru malsupren laŭ la strato **U Balvanu** ĝis la parko; kaj tie apud la parko troviĝas haltejo de interurba tramo per kiu vi povas vojaĝi al Liberec'.

Ĝenerale, konektojn (trajnajn kaj busajn) en Ĉeĥio eblas serĉi per la **reta serĉilo** ĉe www.idos.cz (ĉeĥe, angle, germane). Eblas veturi de Prago al Liberec' ankaŭ trajne, sed ni ne rekomendas tion, ĉar tiuj trajnoj bezonas kelkoble pli multe da tempo, estas pli multekostaj kaj ofte malfruas.

Alveno al la kongresejo

Vojo por ŝofori aŭton (ĝi finiĝas sub la studenta hejmo sed rekte al la studenta hejmo eblas veturi sen problemo, estas sufiĉe da lokoj por parki.


Jen diversaj atingeblecoj:

1) Elirante stacidomon (maldekstre) aŭ bushaltejon (iri supren), oni vidas tramhaltejon, tie oni prenos tramon n-ro 2 aŭ 3 kaj veturas ĝis fino de la trako - al "Lidové sady". Poste oni iras 15-20 da minutoj perpiede.

Tiu ĉi haltejo estas la plej malproksima de la kongresejo, sed ĝi estas la plej bela :) Ĝi ne taŭgas por tiuj, kiuj havas multe da pakaĵoj aŭ se ili estas pezaj.

Uzante la urban trafikon, oni devas uzi veturbiletojn por 16 CZK, kiujn eblos aĉeti ĉe nia bonveniga servo, kiu atendas ĉe la stacidomo kaj ĉe la bushaltejo.

2) Elirante stacidomon (maldekstre) aŭ bushaltejon (iri supren), oni vidas tramhaltejon, tie oni prenos tramon n-ro 2, 3 aŭ 11 (direkto "Lidové sady" aŭ "Jablonec nad Nisou") kaj veturas ĝis la haltejo "Fügnerova", kie oni ŝanĝas al buso. Tie oni prenas la busojn 15 aŭ 29 kaj veturas al la haltejo "Přehrada". Trairu la straton kaj poste sekvu vojeton dekstre, iru supren proks. 3 minutojn. Tiu ĉi vojo estas la plej proksima kaj la plej taŭga por atingi la kongresejon :)



3) Elirante stacidomon (maldekstre) aŭ bushaltejon (iri supren), oni vidas tramhaltejon, tie oni prenos tramon n-ro 2, 3 aŭ 11 kaj veturas ĝis la haltejo Fügnerova (direkto "Lidové sady" aŭ "Jablonec nad Nisou"), kie oni ŝanĝas al buso. Tie oni prenas la buson 19 kaj veturas al la haltejo "Březová alej". Tie oni iras supren proks. 50 metrojn, turniĝas dekstren kaj daŭrigas suben ĉirkaŭ 5 minutojn. Tiu ĉi vojo estas bela kaj nemalproksima :)

5) Bonŝance, ĉe la praga busstacidomo kaj la liberecaj stacidomoj ĉeestos niaj bonvenigantoj, kiuj al vi volonte klarigos la vojon kaj helpos aĉeti biletojn. Serĉu ilin, ili estos facile rekoneblaj.

Adreso de la studenta hejmo:

Technická univerzita v Liberci
Koleje a menzy
17. listopadu 584
CZ-46015 Liberec 15
GPS: N50°46.237
E015°05.201

4) Perpieda vojo - ĝi ne taŭgas pro granda distanco de stacidomo kaj de la bushaltejo. Ĝi daŭras 45-50 minutojn. Memoru, ke en Liberec' estas malfacila surfaco de la pejzaĝo! Tiu-ĉi vojo taŭgas por promeni sen pakaĵoj :)



Kontaktoj:

Marek (prezidanto)
ijk.prezidanto@esperanto.cz

LukiZ (programo)
ijk.programo@esperanto.cz

Julia (sekretario)
ijk.sekretario@esperanto.cz

Daŝa (lokulo)
ijk.ejoj@esperanto.cz

Lastaj Sciindaĵoj

1. Amasloĝejo

Por loĝi en amasloĝejo vi bezonas matracon kaj dormosakon. Eblas kuiru (kunportu vian kuirvazaron kaj manĝilaron).

3. Veganan manĝon ne eblas elekti!

Pro malmulto da interesiĝantoj oni nuligas eblon elekti veganan manĝon. Ni vere bedaŭras tion ĉi. Tiuj, kiuj jam elektis la veganan, povas ŝanĝi la kategorion al la vegetarana aŭ malmendi manĝadon skribu al ijk.ejoj@esperanto.cz.

5. Aktualaj informoj

Ĉe <http://ijk.esperanto.cz/eo> vi trovos multajn aktualajn informojn kaj dokumentojn. Tenu vin informita!

2. Ĉu vi volas loĝi en unulita ĉambro?

Aperis eblo loĝi en unulita ĉambro. Se vi interesiĝas, sufiĉas skribi al ijk.ejoj@esperanto.cz kaj interkonsentiĝi.

4. Veturado en kaj de Prago

Nia retpaĝaro enhavas multajn informojn. Tie ankaŭ troveblas bone verkita dokumento pri la transporto en kaj de Prago (Praha).

